

# ESPERANTO

## TRIUMFANTA

Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj. Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

**Profektantoj:**

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gill North, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-  
direktoro, Kaunas.

**N-o 149b**  
**4. 8. 1923**

**Redakcio:**

Ĉefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
Zanol (literaturo)  
M. Butin, L. K.

**Administracio:**

(Preciza poŝtadreso)  
Esperanto Triumfonta  
Horrem bei Köln, Germanlando.  
**Tarifen**  
vidi sur speciala foto, kiu estas aldon-  
ata al ĉiu specimena kaj unua numero  
de nova abono.

**Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa**



Prof. D-ro Joh. Dietterle  
Prezidanto de la XV-a Universala Kongreso

**Impresoj.**

**Sunbrila mateno.**

Kiel mia animo estas hodiaŭ la ĉielo: serena, senfine blua, sennuba ĝi sternas sin super la vasta urbo.

Jam frue mi ellitiĝis por ĝui la belan matenon. Tute sencele mi travagas la mallargajn stratojn, ĝojas pri la ĉiam ŝanĝantaj vidaĵoj fiere grandiozaj aŭ ĉarme intimaj. Preter antikvaj domoj, majestaj preĝejoj, mezepokaj palacoj mi iras, sur facile volbitaj masivaj pontoj, trans placoj kun belartaj putoj kaj monumentoj.

Subite mi staras sur la altaĵo, sur kiu levigas

la antikva kastelego superstaranta la urbon kaj rigardanta malproksimen en la landon. De tie mi admiras nekompereblan perspektivon. Je miaj piedoj kuŝas la domarego de Nürnberg, el kiu elstaras — kiel fingroj montrantaj ĉielen — la turoj de l' preĝejoj, la altaj kupoloj kaj multaj minaret-similaj fumturoj — signoj de la vigla industrio de l' kongresa urbo. Longtempe mi restas, rigardante kaj ĝuante la belan perspektivon. Sed jam estas tempo por iri al la Kongresejo, kie okazos la Malferma Kunsido de la XV-a.

**Malferma Kunsido.**

Potence muĝas la sonoj de l' orgeno tra la salonego. Kelkmiloj da homoj levigas de siaj seĝoj kaj starante kantas himnon de espero kaj interkompreno. Ekregas solena atmosfero. Entuziasmo plenigas la korojn.

Mirinde ornamita estas la granda festsalono. La scenejo prezentas la panoramon de Nürnberg kun ĝia alta kastelo, super ĝi ŝvebas verda stelo. Sur la scenejo lokigis la „eminentuloj“ de nia movado kaj la ĵurnalistoj. Maldekstre estas aranĝita honordekorajo kun la busto de D-ro Zamenhof, en logio dekstre de la scenejo sidas la edzino de la majstro, s-ino Klara Zamenhof. La salonegon mem kun ĝiaj apudaj ejoj kaj galerio plenis homamaso — vere granda familio konsistanta el anoj de pli ol kvardek nacioj. Super la homamaso pendas, de la plafono, grandega verda stelo, ornamita per bildoj kaj emblemoj pri la diversaj partoj de l' mondo.

Entute — fierega ĝuajo por ĉiu Esperantista okulo.

Mi ne tedos vin per priskribo de la kunsido mem, pri ĝi jam raportis ET. Mi nur volas ripeti, ke ĝi estis etika, grandioza manifestacio por nia nobla ideo, kian oni ĝis nun ne vidis. Kaj ĝi ankoraŭ pliserenigis mian animon. Onklo Serena.



D-ro A. Steche  
Prezidanto de la Germana Esp. Asocio.

**Ĉu la estontaj Universalaj Kongresoj Esperantaj similu al la antaŭaj?**

Unue ni respondu al kelkaj demandoj plej elementaj: Kio estas la Universalaj Esp. Kongresoj, el kiu konsistas la kongresanaro, kion ĝi faras dum la Kongreso kaj kiaj estas ĝiaj rezultoj?

La respondoj estos koncizaj, ĉar plaĵversajne kontraŭdiroj faktaj ne estos eblaj.

La Universalaj Kongresoj de Esperanto estas kunvenoj por „manifestado de la sento Esperantisma“, por babiloj kaj kabaredoj, por iom mizeraj laŭ sia enhavo kaj rezulto laborkunsidoj kaj — bonokaze — por internacia praktikado de Esperanto.

**Rothenburg.**

**Lokigo, nomo kaj loĝantaro.**

„Rothenburg ob der Tauber“, t. e. ĝia plena nomo, kuŝas oriente de Frankenhöhe (Franka Altaĵo), en alteco de 426 metroj super la marnivelo kaj 60 metroj super la serpentinaj rivero Tauber. Ĝia lokigo similas al tiu de Jerusalemo, tial oni nomas Rothenburg ankaŭ „Franka Jerusalemo“.

La nomo de Rothenburg devenas de la radikoj „rot“ aŭ „rotte“ (latine „rupta“), t. e. „aro, amaso, komunumo“, kaj de „burg“, t. e. „kastelo“.

Rothenburg nombras e. 9000 loĝantojn.

**La vidindaĵoj de Rothenburg.**

Rothenburg prezentas kompletan, neŝanĝitan bildon de mezepoka urbo. Ĝi estas, por tiel diri, unu sola granda muzeo pri mezepokaj historio, arkitekturo, arto ktp. Multnombraj estas la ĉarmaj strataj bildoj, la muroj, turoj, pordegoj, interesaj domoj. Precipe rigardindaj estas la ses eksteraj kaj la tri internaj pordegoj, la „malnova kastelo“, la norda kaj suda finoj de la urbo, la placoj, la patriciaj domoj; vidindaj estas ankaŭ la preĝejoj el ĉiuj fazoj de l' gotiko, la profanaj konstruaĵoj de gotika kaj renesanca stiloj, la pentraĵoj kaj la artmetiaj majstraĵoj.

**Promenado tra la urbo.**

La ĉefa ornamo de Rothenburg estas ĝiaj nekompereblaj ĉarmaj, intimaj strataj bildoj. Tial estas rekomendinde, se oni ne havas tempon por resti kelkajn tagojn en la „Juvelujo el la Mezepoko“, trapromeni la urbon laŭ difinita plano.

Forlasinte la *Stacidomon*, oni sekvu — por veni en la internon de la urbo — la *Ansbacherstrasse* (Strato de Ansbach) al bastiono *Röderbastei*, iru tra *Rödergasse*, sub arkaĵo *Röderbogen*, preter *Marksturm* (Turo de Marko), tra *Halengasse* al *Marktplatz* (Foirejo). Tie staras la *Urbdomo* kun gracia turo, la *Trinkstube* („Trinkejo“, nun poŝtejo) kun interesa artmetia horloĝo, kaj multaj fieraj patriaciaj domoj; sur la foirejo troviĝas bela puto, prezentanta S-tan Georgon.

Por rigardi la nordan parton de la urbo, oni iru de la *Marktplatz* (Foirejo) tra *Herrngasse* (Sinjora Strato), kiun flankumas patriciaj domoj kun altaj frontonoj kaj blazonornamitaj portaloj. Preter la Preĝejo de la Franciskanoj kaj tra *Burgtor* (Kastela Pordego) al t. n. *Alte Burg* (Malnova Kastelo). Iam tie staris fortika kastelo, kon-



Rothenburg  
Ĉarma strata bildo ĉe t. n. „Plönlein“.

struita — laŭ la legendo — jam en la jaro 409 p. K. de la franka dukto Pharamond. Nun oni eĉ jam ne trovas ĝiajn ruinojn; sed de tie oni ĝuas belan rigardon en la krutan valon de la Tauber-rivero kaj sur diversajn partojn de la urbo mem. Estas rekomendinde de tie sekvi promenejon laŭlonge de la murego norden al la rotondo de bastiono *Klingen-*

*bastei* kun *Klingentor*. Jen denove al ni prezentigas neforgesebla ĉarma, pentrida bildo: la turo ornamita per balkonetoj, la bastiono, dogandometo, gotika preĝejo *Schälerskirche* kun pordega domo, blazonumita ĝardenenirejo, pordego kaj foso okcidente kaj la t. n. *Stralturm* (Punturo). De *Klingentor* oni iru tra *Klingengasse* al Preĝejo de S-ta Jakobo (konstruita 1373-1450), de tie trans *Schulplatz* (Lerneja Placo), kie troviĝas la gimnazio, tra *Georgengasse* ĝis *Weisser Turm* (Blanka Turo). Tie oni turniĝu dekstren, transversu la *Kapellenplatz* kaj atingu, sekvante la *Lammgässchen* (Safida Strato), denove la *Marktplatz* (Foirejo).

Restas ankoraŭ rigardota la suda parto de la urbo. Oni denove eliru de la *Marktplatz* (Foirejo) tra *Schmidtgasse* (Strato de Förgisto), preter Preĝejo de S-ta Johano, plue al turo *Siebertsturm*. Tie oni ĝuas belegan stratan bildon ĉe t. n. *Plönlein*. Oni sekvu la deklivan vojon malsupren, tra *Koboltzellertor* kaj promenu laŭlonge de la murego, ĝis kiam oni staras antaŭ la enirejo (dekstre) al Kurhotel Wildbad. Oni turniĝu maldekstren tra *Spitaltor* (Hospitala Pordego). Maldekstre oni vidas komplekson da domoj, konsistantan el hospitalo, preĝejo, bierfarejo, bakejo, staloj ktp. De tie oni povas aŭ tra *Spitalgasse* kaj *Schmidtgasse* denove atingi la Foirejon, aŭ tra *Spitalgasse*, *Neugasse* kaj *Ansbacher Strasse* reiri al la Stacidomo.

Specialan alineon ni devas ankoraŭ dediĉi al fama renesanca portalo troviĝanta en la korto inter la malnova kaj la nova urbdomoj, kaj kiu estas preskaŭ seninterrompe sieĝata de pentristoj kaj pentristinoj; ĝi estas vere unika artaĵo, bedaurinde jam parte detruita per korodo. Neniu vizitanto de Rothenburg forgesu rigardi ĉi tiun portalon.

Post la rondirado oni povas refreŝigi en unu el la bonaj restoracioj, bierejoj, vinejoj kaj kafejoj, kies nomoj eĉ memorigas pri la „bona pasinta tempo“ — ekzemple *Ruga Koko*, *Verda Arbo*, *Ora Safido* k. a.

Forlasinte Rothenburg, oni certe prenos kun si agrablan rememoron pri unika vidaĵo, nur maloŭte — se entute — trovebla en la vasta mondo.

**PROLOGO**

parolita okaze de la festprezentado de "La Majstrokantistoj de Nürnberg" en la urba teatro, la 2-an de aŭgusto.

Nürnberg bovenizas la tutmondan festanaron.  
HANS SACHS: KARL MARX.

La kongresanoj konsistas el relative ne granda nombro da aktivaj Esperanto-movado-gvidantoj kaj reprezentantoj de diversaj Esperanto-institutoj pli malpli gravaj, kaj el nombro da personoj, bonuzantaj sian monon kaj libetomempan por vojaĝi al tiujaraj Mekka'o de Esperanta fidelularo; la resto (kaj laŭ nombro tre ŝatinda) partoprenas simplan ekskurson aŭ plezurvojaĝon. Versajne kelkaj eĉ jam alutimigis same ĉiujare vizitadi la kongresurban, kiel aliaj ĉiujare vizitas Ostende aŭ Monte-Carlo.

Sian laboron la kongresanaro efektivas per vizitado de restoracioj kaj kabaredoj, per interparoloj, per kolektado de subskriboj, partopreno ĉe festenoj kaj bankedoj, per manifestado dum ĉiuj okazoj cititaj de la „internacia frata sento Esperantista“ kaj per kelkfoja porkelktempa vizitado de la tielnomataj labor-kunsidoj.

La rezulto de la Kongresoj estas jena: multaj elspezoj por kongresanoj, multaj profitoj por gastecestroj, malmultaj enspezoj por Esperanto-eldonejoj, kelkaj decidaj kaj interkonsentoj pri pli malpli gravaj aferoj de la instituciaj gvidantoj kaj reprezentantoj kaj neniam devigaj, malaltvaloraj kaj parte naive produktataj deziresprimoj de la kongresaj labor-kunsidoj.

Krome — ankoraŭ unu sekvo — la impresoj pri seriozeco kaj organiziteco de la Esp. movado restas pleje negativa por ĉiu fremda interesiganto por la Kongreso.

Versajne per tio ankaŭ klarigas la negativa por Esperanto-propaganda rezulto de la lastaj kongresoj.

Esperantistoj kuraĝu tion konfesi! Rezulte de ĉi-tio estas klara la relativa (se ni evitas pli krudajn vortojn) sentilo de la nunmaniere organizataj Universalaj Esperanto-Kongresoj.

Sed la „popolo Esperantista“ ja bezonas iajn festojn internaciajn, kaj same necesas kelkaj ĉiujaraj generalaj deziresprimoj por la Centraj Institutoj Esperantistaj. Per kio do anstataŭi la nunajn kongresojn?

Sajnas ke la respondo povas esti simpla.

Ĉeestante la Universalan Kongreson unuafaje kaj versajne ne havante ŝancojn ree ĝin viziti en la estonteco, do estante, fidele, persono flanke staranta kaj por tio objektiva, mi jene solvus tiun problemon, espereble je reciproka kontentigo kaj bono de la Esperanta movado.

Se certa kategorio de Esperantistoj bezonas internaciajn festojn, ili estu aranĝataj sub la formo de internaciaj "Esperanto-Semajnoj" aŭ eĉ "Dusemajnoj".

La laborajn kunsidojn kongresajn anstataŭi internaciaj konferencoj de reprezentantoj de certaj organiziaĵoj kaj institutoj. Al la konferenciaj kunsidoj — ĉefe la solenaj — povas ja esti allasata ankaŭ la Esperantista popolo.

Sed fakte la veran laboron faru ne la memformiginta kongresanaro, sed la personoj havantaj por tio ian formalan rajton. Eĉ deziresprimoj de tia Konferenco estos pli valoraj kaj pli aŭtoritataj ol la nunaj, ofte de hazardo dependantaj.

Por la Semajnoj Esperantistaj kaj la Konferencoj (se oni insistas, ili ja ankaŭ povas nomiĝi Kongresoj) oni laŭeble elektu lokojn, kiuj povu servi kiel ripozejo por la alveturantoj. Grandaj urboj tute ne estas preferindaj, eĉ ne de vidpunkto propaganda — tion oni jam spertis. La diversaj favoroj por la kongresanoj estos same facile rezervataj por la semajnanaro. Kaj la semajnanaro povas same bonuzi la tempon kiel ĝis nun por fakaj kunsidoj, paroladoj, koncertoj kaj internacia manifestado de la Esperantismo.

Kaj Esperantaj Kongresoj neniu jam povus moki pro la groteska nekonformo de la kongresa legdonanta nomo al ilia enhavo.

Entute do malgajnus nenio, kaj la movado mem profitus morale. Kaj ĉu do tiam ne valoras tion fari?

E. Dr.

**Oficiala karavanovojaĝo al Hungarlando.**

Ĉar kelkaj samideanoj esprimis la deziron, viziti post la Nürnberga Kongreso Budapeston, la Hungara Landa Esp. Societo decidis ebligti al ili komunan vojaĝon de Nürnberg al Budapeŝt kaj al la granda lago Balaton. La urba kaj ŝtata fremduloficejo en Budapeŝt interesigis pri la afero kaj transprenis oficiale la tutan aranon preparante komunan vojaĝon, restadon, vizitadon, logigadon kun ĉiuj manĝoj en Budapeŝt kaj ĉe Balaton per vagorano, ŝipo kaj en hoteloj. La tutaj kostoj estos enhavante aŭtomobilajn veturadojn en Budapeŝt sv. k. 150 — proksimume, entenante la vojaĝon de Wien. La oficejo prizorgos ankaŭ la reiran bileton al kia ajn stacio. La organizon oni komisiis al la konata Esperantisto, redaktoro de Int. Medicina Revuo, Dr. Karlo Mezei, kiu jam alvenis en Nürnberg. La partoprenantoj ricevos la oficialan Esperantlingvan programon de la fremduloficejo. Estas apartaj markaraj prezoj por tuj, kiuj ne volas partopreni ĉiujn arangojn.

Koran bonvenon en nia rond',  
Karaj gegastoj el vasta mond',  
Kun ekstra gojo mi salutas vin,  
Sinjoro, Sinjorino kaj Fraŭlin',  
Ĉirkaŭvidante en la nobla dom',  
Aŭdigas al mi fremda idiom',  
Kaj prologante la spektaklon,  
Mi vidas mem la cefmiraklon.  
Ĉu eble?! Malsamlingvaj vi  
Komprenas vin en bela harmoni'.  
Kaj kio estas la peranto?  
La ideala Esperanto,  
Interpopola koridoro  
De hom' al hom', de kor' al koro!

Sed jen mi apostrofas vin  
Kaj tute ne prezentis min.  
Permesu do: mi estas la ŝuisto  
Hans Sachs, apude rimaĉisto,  
Kaj ĉio, kion mi sciigas,  
Sub miaj manoj tuj versigas.  
Pranürnbergano mi prikantus  
La urbon mian kaj ĝin vantas,  
Kontenta, kiam ĝia nomo  
Gloriĝas de London' ĝis Romo.  
Pro tio multe gojas mi,  
Ke vi kunvenis tie ĉi,  
En urb' de ĉiam progresa,  
Por ĉio bela perceptema.  
Ĉe ni vi certe bone festos,  
Multaj deziroj jam ne restos.  
Sed ne fo,gesu, por laboro,  
Inspekti ĉion kun fervoro.

Vi baldaŭ simpatios ĝin,  
De Germanlando la reĝin'.  
Rigardu nur la altajn turojn,  
La resistemajn firmajn murojn,  
La katedalojn artubundajn,  
Fosaĵojn romantik-profundajn,  
Germanmuzeon dokumentan,  
La urbodomon monumentan.  
Kaj fine nian ĉetan belon,  
Nekompareblan la kastelon.

Ho, ĉio feliĝigos vin,  
Kvazaŭ centjara dolca vin',  
Prisoros la historiulon,  
Artiston kaj la metiulon,  
Hejmeca ĉiu sentos sin,  
Plezure vi memoros nin.  
Gastame ĉiu Nürnbergano  
Akceptas vin kun varma mano;  
Se via majstr' ankoraŭ vivus,  
Mi mem, per Dio, lin gastigus.  
Tro tru' finbatis lia kor',  
Sed lia verko daŭros for',  
Kaj kiu dubas pri progreso,  
Tiun konvinku la kongreso.

Ĉu mi maljuna Nürnbergano  
Farigos ankaŭ ideano?  
Tutcerte mia simpati'  
Senreste estas jam ĉe vi.  
Ankoraŭ pli: por Esperanto  
Mi estos gaja atestanto,  
Kaj kiam dormas la filistroj,  
Kaj ŝanceliĝas la ministroj,  
Malprogresemo baras vin:  
Tiam bonvolu citi min,  
Ke mi purigu l'atmosferon,  
Ke mi marŝigu la aferon,  
Por ke la ĉiunondhomaro  
Arigu ĉirkaŭ tiu ĉi altaro  
Kvazaŭ interpopola aks',  
Ke tiu venko baldaŭ venu,  
Ke ĉiu dub' senreste svenu,  
Kvazaŭ en sunradi' la vaks'.  
Tion deziras vin Hans Sachs.

D-ro Richard Ledermann.

**Germana Sciencia Esperanto - Asocio.**  
(Deutsche wissenschaftliche Esperanto - Gesellschaft.)  
Ĉefkunveno: Lundo je la 9 h. n-o 19 (Fakkunsidojejo)  
Gravegaj demandoj.

D-ro Göhl, prez

Se vi ne jam estas abonanto,  
**a b o n u E. T.**  
ankorau dum la Kongreso.

**Kristana Esperantista Ligo:** Kiel estis anoncita en „Esperanto Trlumfonta“ okazis jaŭdon vespere en la domo de la Kristana Asocio de Junaj Viroj (Nürnberg Stertor) publika salutkunveno. Direktis la ordon de la programo s-o P. Hübner, prezidanto de la K.E.L. Unue parolis la estro de la loka societo de la K.A.J.V., kiu kun varmaj vortoj bonvenigis la ĉeestantaron. El la eksterlandaj samideanoj transdonis salutojn la jenaj sinjoroj: H. A. Luyken (Londono), H. Bonnevie (Kristania) kaj S. Leuenberg (Basel).

La Universala Komitato de la Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj en Gen' sendis kiel sian delegiton s-on R. Horner, kiu alportis tre gojigan dokumenton, ĉar la eminenta organizo reprezentas nuntempe 9000 lokajn grupojn kun preskaŭ du milionoj da membroj en la tuta mondo. Per la citita dokumento la Universala Komitato promesas sian konstantan helpon al la kristana Esperantista movado.

Dum la vespero okazis teo-paŭzo por persona interkonatiĝo. La vira horo kantis du belajn Esperantigitajn himnojn.

**Universala Esperanto Asocio Junulara.**

Merkredon, je 10 h matene, okazis kunveno de ĉefdelegitoj de nia anaro sub prezido de s-o Hirschmann (Germanujo). Oni priparolis la novajn statusojn. Estas nove elektota komitato por libertempa interŝanĝo de infanoj de la membroj. Oni nove fondis komitaton por eldono de Esp. libroj por junuloj. La ĉefa fakkunsido okazos sabaton, ĉambro 13.

**Protokolekstrakto**

**de la 1-a kunsido de T. E. K. A. 3. aŭgusto.**

La kunsidon, kiun partoprenas 18 gekuraĉistoj el 7 landoj, malfermas s-o Kleider, en la nomo de T. E. K. A. Post rememorigo pri la mortintoj li proponas, ke, ĉar neniu el la estraro ĉeestas, oni elektu estraron por la daŭro de la kongreso. Oni elektas s-on Sós el Wien kiel prezidanton kaj s-on Kalocsay kiel sekretario, por gvido de la protokolo.  
Estas akceptitaj jenaj proponoj de s-o Blassberg: 1. Oni klopodu kunmeti la liston de ĉiuj nunaj Esperantistoj-kuraĉistoj. 2. T. E. K. A. rekomendas al la estraro uzi Int. Med. Revuon por la komunikoj de T. E. K. A. Medicinistudento Hitrov akcentas la neceson de propagando inter la junularo, inter la studentoj.

Poste faris sian prelegon s-o Perl pri Röntgenoterapio per malgrandaj dozoj kaj s-o Primmer pri terapio de kokaŭno per homia proteino, ambaŭ estos publikigitaj en I. M. R.

Nun s-o Mezei kongigis la estelekon kaj la perspektivojn de I. M. R., kaj post la rimarkoj de s-oj Sós kaj Blassberg la kunsido rekonas la grandan signifon de la revuo kaj priparolas diversajn rimedojn por la firmigo de ĝia financa stato.

**2-a Asocia Tago**

**de „Asocio de Junaj Germanaj Esperantistoj“ en Nürnberg, 3. aŭgusto.**

La provizora prezidanto s-o A. Stern malfermis la unuifantan tagon je 3 h. Li salutis la reprezentantojn de U.E.A.J. s-ojn Hirschmann kaj E. Habelok el Breslau kaj la membrojn, kiuj partoprenis. S-o Hirschmann transdonis la salutojn de U.E.A.J. kaj deziris al la asocio multan feliĉon por la laboro. S-o Stern donis nun sciigojn pri la asocio kaj kazo.

La loka grupo Breslau fordonas nun la oficon de la estraro. S-o Hirschmann gvidis la kunvenon ĝis la novelektita. La C.O. de la A. J. G. E. estas nun elektita el la mezo de la Auerbach's loka grupo. La novaĵ kotizoj estas jenaj:

loka grupo: 15 arĝent fenigoj  
izolitoj: 40 „ „  
eksterord. m.: 100 „ „

La A. J. G. E. aliĝis al U.E.A.J. kaj ricevas la gazeton „Esp. Junularo“. Ĝi pagos po membro 15,000.— g. mk. La prezidanto malfermis la kunvenon je 4 1/2 h. La 3-a asocia tago estos en Plauen la 7. junio 1924. E. Ho.

Antaŭmendu la humorplenon libron  
**Maks kaj Moric de Busch**  
la fama germana humorista poeto kaj genia ilustristo en Esperanto!  
**Braun & Schneider, München I**  
Eldonejo de "Fliegende Blätter".

**Ni serĉas Kunlaborantojn en la tuta mondo**  
Korespondo en germana aŭ Esperanta lingvoj.  
**Spar- u. Credit-Aktiengesellschaft**  
Geschäftsstelle Berlin S. W. 47.

Ĝus aperis granda serioza Esperanta Libro  
**„Litova Almanako“**  
kiu estas senpage donata al ĉiuj abonantoj de „Litova Stelo“. Abonoj estas akceptataj en  
**Kongresa Akceptejo.**

**Foiro de Reichenberg**

Ĉeĥoslovakio okazos tuj post la kongreso de la 11-19. aŭgusto 1923.

Rapida kaj agrabla vojaĝo de Nürnberg-Dresden-Zittau al Reichenberg aŭ de Nürnberg-Eger-Karlsbad al Reichenberg. Foiroj legitimaciaj haveblaj ĉe **SCHENKER & Co., Sandstrasse 24,** per kiu la loirvizitantoj ricevos 75% rabaton al la vizitakso, el bonvaltaj landoj 25%.